

# PENSEO

N-ro 307

majo / 2017

Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

## Anteo (Ĉinujo)

kial el viva fonto fari postmortan nektaron?

2013.12.23



## solida ombro

solida ombro juke emocias maron.  
seksilo venta volas perforti nubaron.  
florvazo historia plenas de ĝem-eĥoj;  
surduloj planas bombe ataki najbaron.

2013.12.19

## en vintra sudo

en vintra sudo geedzoj arbiĝas;  
vataĵoj vindas korpojn kaj dezirojn.  
kiel fridujo domo suk-obstrukca  
isme sufokas kunvaporajn spirojn.

2013.12.21

## nenio estas ĉio

loĝigante songon en kultivbotelon,  
vakaj homoj penas konstrui hotelon,  
kie ili zorgas pri spiritoj ontaj  
kaj vakue kovas senseksan vitelon.



2013.12.22

## admono al jenaj koroj

se kozo imagata povus savi falon,  
kial flugilojn siajn birdoj neniam forlasas?  
se vi ne volus ĝui suraeran staron,

## Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



## efemero

L' aprila suno orflave  
ekridetis sur mia korpo,  
kiu malkonsentas nun  
kun la pasintaj revoj.

Doloroj strekas la pezon  
de l' tempo sur la ostoj;  
kaj mi pli lante paŝas  
malgraŭ l' arboj, kiuj ade  
parolas pri floroj kaj birdetoj.

La tempo ne pasas en la placo:  
estinto kaj estonto ĉiam nunas.  
Estas nur mi, kiu pasas.



Juiz de fora 03/04/2017.

## Mori (Usono)



## AFORISMe (19)

Politikistoj  
kun cerbo de pasero  
respondecas pri  
la Homa mizero!

\*\*\*

Nur maliculoj  
kaj idiotoj  
submetas sin  
je l' servo de despotoj!

\*\*\*

Grandiozas l' diferenco  
inter tiu, kiu bonfaras  
pro bono  
kaj tiu, kiu faras ĉion  
pro mono.

\*\*\*

Kiam al saĝuloj  
mankas kuraĝo  
kaj al kuraĝuloj  
mankas saĝo  
ĉiuj sklave  
vivas en kaĝo!

\*\*\*

Kontraŭ potenco  
de penso  
ne ekzistas  
rezist-potenco.

\*\*\*

La plaj saĝa rimedo  
en arda argumento  
estas eksilento.

\*\*\*

Disdividi la mondon  
je amiko  
kaj malamiko  
estas malica politiko.

\*\*\*

La ĉefa motoro  
en la vivo  
estas motivo.

\*\*\*

Kie Mono  
decidas pri ĉio,  
tie homo estas sklavo  
kaj Mono estas Dio.

\*\*\*

La plej granda sufero  
estas vana espero.

\*\*\*

Riĉeco de riĉuloj  
ne estas certa afero  
dum la plejmulto vivas  
en mizero.

\*\*\*

Kie ĉiu homo kondukas  
kvazaŭ eta sultano  
ĉiuj suferas  
sub granda tirano!

\*\*\*

Malmulte da parolo  
kaj multe da silento  
estas signoj de saĝo  
kaj prudento.

\*\*\*

Politikisto  
estas kiel blindulo  
kiu mem la vojon  
ne vidas  
kaj aliulojn misgvidas.

\*\*\*

Timo  
ne baras la Morton  
sed forŝtelas  
vivforton.

\*\*\*

Se mankus lakeoj  
kaj idiotoj,  
per si mem falus  
despotoj.

\*\*\*

Sana ,  
libera kaj riĉa,  
estas la plej feliĉa.

\*\*\*

Kun saĝa kapo  
kaj bona koro  
Utopio kre-eblas  
sur la tero.

\*\*\*

Pri la mizero  
de homoj malriĉaj  
plejparte respondecas

homoj riĉaj.

\*\*\*

Tiuj, kiuj mensogas  
per la okuloj  
estas la plej lertaj  
mensoguloj



### Paŭlo Silas (Brazilo)



MI KLARIGAS,  
VI KOMPRENAS.

Estas sencele, ke vi dronas en streboj.  
Ankaŭ ĵetiĝi al la dornoj de la veproj.  
Se vi travadas, kun trankvilo, la riveron;  
Preteratentas tre, de l' akvoflu', l' akcelon.

Hontosignite staru hom' obstin-sintena.  
Certe malordas, tra la korpo, pulso vejna.

En terurŝvito, vi sin banas, ĉar vi volas.  
Kial vi pensis, ke, se brilas, ja valoras?

Ostreliefa, la mieno via iĝos.  
Ba! La enigmon vi neniam ekdeĉifros!

Kulovualo por protekti la infanon...  
Bone! Sed kudru ĝin kun fero, ne kun lano...

Ĉu ĉiapreze vi ekpaŝas al la celo?  
Lasu do kiel garantion la koheron...

Nun trankviliĝu. Mi prethavas ion bonan:  
Sur kuŝoseĝo plu ripozu senrezona.

### Wally Du Temple (Kanado)



Memeo kaj geno

(Richard Dawkins originis la esprimon, *memeo*, en sia libro 'The Selfish Gene' en 1976) Ĉu li malgajis kiam plimulto voĉdonis referendumo en 2016 forlasi la Eŭropan Komonumon?

Klarigis li—

“Memeo egale valoras kiel geno.

Memeo nomas ĉian eron  
de kultura informo

kiun unu menso donas al alia menso.

Pensoj, ideoj, teorioj, kutimoj,  
Kantoj, dancoj, artoj,

Kaj Lingvoj.

Kaj tiel plu, tiel plu, plu, plu.

Memeoj reproduktiĝas kaj evoluas

Same kiel genoj en biologia evoluo.

Ili ekzistas aliforme por adaptiĝi

Por variigi, mutacii, konkurenci, heredigi

Kaj bezonas ĉiajn engaĝigojn

Por plu vivi, plu vivi, por plua

Evoluo.

Klarigis li—

“Memeo egale valoras kiel geno.

Geno indikanta proteinojn

Ekzistas en multaj statoj

Kiel Rusaj pupoj nestas unu en alian.

Genetikaj aliformiĝoj kreas

Diversecon por sekurecoj

Por ekresaltemeco de detruo, ek, ek, ek

de ajnaj ŝanĝkondiĉoj

En mondo de

Geologiaj kataklizmoj

Kaj klimataj katastrofoj.”

Nek muroj nek forkuroj

De dialogoj kaj disputoj

Pretigos la homaron

Por necesa adaptiĝo.  
 Nur diversaj konkurantaj kulturoj  
 Pretigos la homaron por la necesa  
 Ekresaltemeco, ek, ek ,ek  
 de ajnaj ŝanĝkondiĉoj  
 En mondo de  
 Geologiaj kataklizmoj  
 Kaj klimataj katastrofoj.”

Kaj lingvoj jese, ankaŭ, jese gravas  
 Kiel memeoj plej gravaj.  
 Ili entenas, volvas kulturojn  
 Kiel haŭto entenas, volvas korpojn.  
 Se forbruliĝas tro da haŭto, morto de persono.  
 Se malaperas tro da parolantoj, morto de  
 kulturo.  
 Lingvo estas la haŭto de ajna kultura grupo.  
 Mi oponas kaj Genecidon kaj Memeocidon!



## Takashi Ito (Japanujo)



jen vintra korvo ...


frosta ĉielo ...  
 malĝojo el fumtubo  
 blankete ŝvebas

ja fora fajro  
 nur eĥo en mallumo ...  
 povra fenestro

kiel kviete ...  
 ĉe fabriko-ruino  
 neĝa vualo

jen vintra korvo ...  
 turnante la dorson al  
 la blanka luno

malvarma luno  
 jen prilumas riveron ...  
 trista pasanto



*ilustraĵo de la aŭtoro*

## Ivanichka Madgharova (Bulgario)



*Seria da hajkoj*

Taso da amo  
 en la sin' de l' patrin o.  
 Kristnasko venis.



Vent' furiozas.  
 Timtremadas la branĉoj.  
 Ĉevaloj kura s.



Ŝtormo en maro.  
 Retojn tiras fiŝistoj.  
 Patrinoj tremas.

Ventego. Branĉoj.  
 La rivero nigriĝis.  
 La tero spiras.



Subita pluvet'.  
 Paser' etendas flugilojn.  
 Agroj malsekaj.



Jam vesperiĝas.  
 Seka herbo sur kampo.  
 Sablo malseka.



Ekveturis trajn'.  
 Tristaj adiaŭantoj.  
 Sur kajo sako...

## Henriko Heine (1797-1856)



Kun obstin'  
tra l' anim'

Kun obstin' tra l' anim'  
iras tintilado.  
Sonu, kanto kun inklin'  
monden en beato.

Iru son' ĝis la dom',  
kie floroj ludas.  
Se jen kreskas roz' en fon',  
diru: Mi salutas!

STRENEZEMO

Stultaĵojn mi faris, stultaĵojn dum vag'.  
Stultaĵojn plu mi eĉ faris.  
Mi faris ilin dum nokt' kaj tag',  
la noktaj eĉ pli barbaris.  
Mi faris ilin sur ter' kaj mar',  
ekstere kiel hejme.  
eĉ faris multajn kun mensa klar',  
kaj tiujn plej stulteme.

*Esperantigis*



**Cezar (Germanujo)**

## Fan Zhongyan (989-1052)



Turmentas  
Hejmsopiro

— Laŭ melodio Sumuzhe  
Bluaj nuboj en la ĉielo.  
Flavaj folioj sur la tero.  
En ondojn fandiĝis aŭtuno.

Akve smeraldas frosta fumo.  
La subiranta suno monton kisas.  
Ĉielo kaj akvo interligiĝas.

Despli turmentas hejmsopiro  
ekstere de la sunsubiro.  
Malsarena pensdevio  
kroĉiĝas al nostalgio.  
Ĉiunokte nur sonĝo bona  
retenas min al lit' dormdona.  
Sub brila lun' en alta turo,  
ne restu soleca figuro.  
Ĉar vino en trista intesto  
larmiĝis amsopira manifesto!

*Esperantigis*



**Hu Guozhu (Ĉinujo)**

## Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKUNUA

Lasu fari kaj toleru

### §11-01

Mi aŭdis, ke oni devas lasi la mondon al ĝi mem kaj esti tolerema al ĝi, sed mi neniam aŭdis pri regado super ĝi. Oni devas lasi la mondon al ĝi mem pro tio, ke oni timas, ke la homoj perdos sian denaskan naturon. Oni devas esti tolerema al ĝi pro tio, ke oni timas, ke la homoj ŝanĝos sian propran virton. Se neniu el la homoj perdos sian denaskan

naturon, nek ŝanĝas sian propran virton, kiel do estas necese, ke oni regu la mondon?

En la antikveco, kiam la reĝo Yao regis super la mondo, li faris, ke la popolo vivu en tro granda ĝojo. Tiam ĉiu tro kontente ĝuis sian denaskan naturon kaj sekve ne plu ekzistis kvieteco. Kiam la reĝo Jie regis super la mondo, li faris, ke la popolo vivu en tro granda afliktiĝo. Tiam ĉiu malkontente subpremism sian denaskan naturon kaj sekve ne plu ekzistis plezuro. Tiu, kiu havas nek kvietecon, nek plezuron, ne povas konservi sian propran virton, kaj tiu, al kiu mankas la virto, neniel povas vivi longan vivon.

### §11-02

Esti tro ĝoja malutilas al la janga elemento, dum esti tro kolera malutilas al la jina elemento. Kiam la jino kaj la jango ambaŭ estas en malordo, tiam la kvar sezonoj ne plu regule alternas kaj la homoj devas adapti sin al la misharmonieco de la varmo kaj la malvarmo. Rezulte de tio la homoj devos elporti fizikajn suferojn pro tio. Ili havos kapricajn emociojn de ĝojo kaj kolero, sentos sin tre maltrankvilaj, ne povos plu regi sian pensadon kaj konstante forlasos aferojn duonvoje sen ilin finplenumi. Sekve la tuta mondo fariĝos la viktimo kiel de artifiko, ruzajtoj, trompoj, tiel ankaŭ de orgojlo kaj antaŭjuĝo, kaj tiel aperos la misagoj faritaj de tiaj homoj, kiaj estis Zhi la rabisto, Zeng Can kaj Shi Qiu. Por meti finon al tia malordeco, estas ne sufiĉe rekompenci la bonulojn per ĉiuj trezoroj de la mondo, nek sufiĉe puni la malbonulojn per la ĉiuj punoj de la mondo. Tial la mondo, kiel ajn granda ĝi estas, estas neniel sufiĉa por rekompencoj kaj punoj. Ekde la epoko de la tri dinastioj Xia, Shang kaj Zhou oni ĉiam brue sin okupas pri la rekompencoj kaj punoj. Kiel do oni povus dume trovi la tempon por sekurigi sian denaskan naturon?

Cetere, kiu amas akran vidadon, tiu sin

fordonas al la plezuro de koloroj; kiu amas akran aŭdadon, tiu sin fordonas al la plezuro de sonoj. Kiu amas la humanecon, tiu perturbas sian virton. Kiu amas la justecon, tiu metas sin kontraŭ la racio. Kiu amas la ritojn, tiu helpas al artifiko. Kiu amas la muzikon, tiu dronas en diboĉo. Kiu amas saĝecon, tiu disvolvas en si la ruzecon. Kiu amas scivolecon, tiu disvolvas en si ĉikanemon. Se la homoj en la mondo volas sekurigi sian denaskan naturon, estas por ili tute egale, ĉu tiuj ĉi ok kvalitoj estas atingitaj aŭ ne. Se la homoj en la mondo ne volas sekurigi sian denaskan naturon, tiam tiuj ĉi ok kvalitoj nenormale disvolviĝos, tiel ke la mondo estos ĵetita en konfuzon. Kaj tamen ĉiu en la mondo honoras kaj alte ŝatas ilin! Granda ja estas la eraro de la mondo! Ili estas tiel piaj parolante pri ili, tiel respektaj prezentante ilin kaj tiel ravitaj kantante laŭdojn al ili. Kion do mi povas fari kontraŭ ĉio ĉi tio?

Tial, se la saĝulo estas devigita okupi la postenon regi super la mondo, tio, kio estas la plej farinda por li, estas fari nenion. Lasu la mondon al ĝi mem, kaj li povos sekurigi la denaskan naturon de la popolo.

Sekve tiu, kiu alte ŝatas la landon kiel sin mem, povas esti konfidata regi sian landon; tiu, kiu amas sian landon kiel sin mem, povas esti rajtigita regi sian landon. Tial, se la saĝulo povas reteni siajn pasiojn kaj kaŝi siajn inteligentecon, li aspektas tiel vigla kiel drako dum li kviete sidas, kaj lia voĉo sonas kiel tondro dum li gardas la silenton. Lia spirito moviĝas, sed li restas ĉe si mem kaj faras nenion, lasante ĉiujn estaĵojn liberaj kiel la ŝvebanta fumo kaj la flosanta polvo. Tiuokaze, kiel do estus necese, ke li faru la regadon super la mondo?

*elĉinigis*



**Wang Chongfang**

**(Ĉinujo)**

# Ĉineske

## Vejdo (Ĉinujo)



### Printempa vent'

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo\*

Vent'  
blovas el l' orient'  
susure  
per dolĉa turment'.

Jen  
ludas sur herba teren'  
ĝi sible  
tra mia ĝarden'.

Jen  
ĝi ĝoje flirtas sen ĝen'  
leĝere  
kun burĝona ĉen'.

Jen  
ĝi kisas ŝosojn kun ben'  
ameme  
en suna festen'.

Jen  
dancas en freŝa maten'  
ĝi sur roj'  
post glacia sven'.

Vent'  
vekas ja per varma sent'  
naturon  
al viviga splend'.



\*Dekses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj  
de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

## Forto de kampuloj

el rakontoj pri Afanti  
—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*

La reĝo  
iĝis scivola  
kaj alvokis Afanti  
por demando petola  
kaj ŝajne fola.

“Vi ĉien  
migris tra la mond'.  
Ĉu vi eltrovis iun  
pli forta ol mi per sond'  
en la pleba rond'?”

Afanti  
diris mokride  
“Tre multajn, via moŝto!”  
Reĝ' kapneis malfide  
ĉuis rapide:

“Ho, kiuj  
estas personoj  
pli fortaj ol mi fakte?”  
reĝo ĉuis en tono  
duba sur trono.

“Ili ja—  
kampuloj vere!”  
Afanti jen respondis.  
“Fi!” la reĝo kolere  
diris, “Sufere

ja ili  
vivas kaj nure  
povas plugi. Do kiel  
pli fortus ili sure  
de mi nature!”

Afanti



refutis moke,  
 “Vi eraras, reĝa moŝt’!  
 Ili ja fortas roke  
 kaj viglas boke.

Se ili  
 ne nutradus vin,  
 kian forton vi havus  
 por domini kun sangvin’  
 stari sen kapklin’?”



## Gajo (Ĉinujo)



## Verdaj steloj brilas

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*  
 En Ĉini’  
 la verdaj steloj  
 super nordokcidento  
 glimbrilas kiel perloj!  
 — monda espero!

Verduloj  
 sur *Ora Ponto*<sup>1</sup>  
 post Trezoro kaj Ardo<sup>2</sup>  
 marŝadas *Tra la Mondo*<sup>3</sup>  
 spit’ al tajdondo!



1. *Ora Ponto: Esperanta Centro Ora Ponto en Jingchuan, Gansu, Ĉinio, starigita de Trezoro, Ardo kaj aliaj.*
2. *Ĉinaj eminentaj esperantistoj*
3. *Tra la mondo: esperanta gazeto kuneldonita de*

*E-centro Ora Ponto kaj E-rondo de Germanio en  
 januaro, 2017*

## Printempa bildo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo\*  
 Paseroj  
 trilĉirpas kun ĝoj’,  
 ekverdas salikbranĉoj,  
 fiŝoj navetas en roj’,  
 aŭdiĝas hundboj’!

\**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksfirma  
 poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo  
 xa,xa,a (x=senrima).*

## Bedri Alimehmeti

## Aŭskultante Ĉelentano-n\*

Hieraŭan vesperon, Adriano  
 Mi apenaŭ ploris pro mia juneco,  
 Kiu elĉerpiĝis sur paro da ŝuaĉoj,  
 Elmanĝita ĉe la kalkanoj,  
 Sur velŝtofaj pantalonoj, maldikiĝintaj  
 Kaj sub jako el veluro senkolorigita  
 En la kies kolumo  
 Senfine silentas  
 La distingilo “Amiko de la libro”,  
 Ĉi tiu eŭnuko  
 Gardisto de la miaj pensoj.

La hieraŭan vesperon mi apenaŭ ploris pro  
 mia juneco.  
 La hieraŭan vesperon mi havis naskiĝtagon,  
 Adriano.  
 Hodiaŭ, posttagmeze, kun la patrino,  
 Estis griza posttagmezo,  
 Ni estis en la prizono, renkontis tie la patron;  
 Estis kun ni ankaŭ la fratino kaj la eta frato.  
 Triopo da infanoj, kiuj ĝis hodiaŭ  
 Ne bonŝancis nin konduki,  
 Al la lernejo  
 Almenaŭ unufoje, la patro.  
 Trans du paroj da ferkradoj, krucigitaj;



Pala luno en la perdiĝintejo de la puto;  
Flava vizaĝo de mia patro.

La hieraŭan vesperon mi apenaŭ ploris pro  
mia juneco.

La hieraŭan vesperon mi havis la naskiĝtagon,  
Mi agis bone ke ne verŝis larmojn.

Kia sorto, Adriano!  
Vekiĝi per la melodio de via nova kanzono  
Kaj kanti kun vi:  
“La domani, chisa...”  
Morgaŭ, kiu scias, Adriano, kiu scias, kiu  
sciiias...

1962

\* *elstara itala kantisto*

## La junulino el Tirana

La varmecon de la rigardo  
Vi jam forprenis de la brilaj sunradioj.  
O, suna junulino el Tirana!  
La porcelanan blankecon de la haŭto  
Vin jam donis la neĝo de la Dajti- pinto.  
O, pura junulino el Tirana!  
La verdecon de la okullumoj,  
Vin donacis la kronaj montetoj.  
O, verda junulino el Tirana!  
La bluecon de la animo  
Vi forprenis de la horizontaj spacoj.  
O, ĉieleca junulino el Tirana!  
La radiadon de la beleco vi jam absorbis  
El la matena roso.  
O, kristaleca junulino el Tirana!  
La persikecon de la vizaĝo  
Vin donacis la matena purpuro.  
O, freŝa junulino el Tirana!  
La vian altstaturon  
Plilongigis la cipresoj de Namazgja\*.  
O, markoteca junulino el Tirana!  
Vian silkan hararon  
Ellavis la akvofontoj de Selita,  
Streĉitajn vi lasis ilin sub la briletantaj  
sunradioj,

Dum ilin kombis la luna arĝentado.  
O, sorĉeca junulino el Tirana!

Septembro, 1963

\* *verda parko en Tirana**Esperantigis***Bardhyl Selimi****(Albanio)****Aleksandr Starostin**

## Reĝino de plaĝo

Eventoj, pri kiuj mi rakontos, koncernas tiujn neklarigeblajn momentojn, kiuj iufoje okazas en vivo, kaj pri kiuj post ioma tempo oni rememoras kiel pri ia ne klara sonĝo ne sciante, jen tio estis reale, jen tio estas fantazio. De unu flanko oni klare memoras ĉion, sed de alia flanko oni ne povas trovi racian klarigon.

Tiuj mistikaj eventoj okazis kun mi dum kutima promeno. Eventoj okazis en unu el plej belegaj lokoj de Moskva regiono, en Kljazmenskoje akvokonservejo, en Verda Haveno.

Mi ŝatis en varma suna tago promenante laŭ bordo de akvokonservejo admiri senfinan akvan surfacon, helajn blankajn velojn de jaktoj, navigantajn ŝipojn, flugantajn mevojn. Kutime mi venis ĉi tien sole, por ke neniu malhelpu miajn meditojn kaj kontempladon.

Foje en libera tago mi kiel ĉiam piede iris al arbaro, kiu disvastiĝis laŭ grandega spaco en bordo de Kljazmenskoje akvokonservejo. Estis varmege, suno estis en zenito, sunaj radioj netolereble varmigis, kaj mi rapidis eniri al arbaro, kie estas freŝo kaj belegaj odoroj de herboj, pingloj, putraj folioj. Mi devis trairi rondan placeton, en rando de kiu estis busa haltejo. Al haltejo ĝuste alveturis buso kaj alveturigis novajn ripozantojn. Ili brue eliris el buso kaj iris tra placeto al arbaro. Apud mi iris aŭ virino aŭ junulino, mi, rigardinte ŝin pase, ne komprenis, kiu estas ŝi. Ŝi demandis:

- Bonvolu diri, ĉu ĉi tie estas boata stacio?
- Jes, ĝi estas.
- Ĉu vi montros vojon al ĝi?

– Mi iras al sama direkto. Iru kun mi.

Ni malleviĝis laŭ larĝa ŝtuparo al ĝiba ponto, kiun oni konstruis trans rivereto, kiu enfluis en akvokonservejon, kaj eniris al arbaro.

Arbaro renkontis nin per freŝo kaj malvarmeto, per sekretaj sonoj kaj odoroj, per ludo de sunaj radioj eniĝantaj tra foliaro, per densejo de arboj de lonicerio kaj per ekstravagancaj ombroj, kiuj interkrucigis nian vojon. Vojo kondukis nemulte supren inter maloftaj arboj. Vojo jen disbranĉiĝis je multo de vojetoj, jen denove unuiĝis en unu vojo. Mi rapidis kaj iris nedecce rapide. Mia kunirantino portis sur ŝultro grandan sakon kun surskribo “Dinamo” kaj apenaŭ sukcesis post mi. Iufoje ŝi demandis: “Ĉu ĉie estas tia kruta bordo?”, “Ĉu estas malkruta sabla bordo?”, “Ĉu longe iri al boata stacio?” kaj tiel plu. Mi respondis per unu vorto por ne malpliigi rapidon, elektante plej mallongan vojon. Mi povis preni ĉe ŝi sakon, sed mi timis, ke ŝi konsideros tion kiel amindumon, kaj tiam mi ne povos liberiĝi kontraŭ ŝi. Sed post ioma tempo mi tamen ne eltenis kaj proponis al ŝi porti ŝian sakon. Ŝi kun ĝojo donis ĝin al mi.

Preteririnte negrandan ravinon kun malgranda rivereto, kiu fluis inter putraj folioj, ni atingis monteton, la plej altan altaĵon en tiu loko, kaj leviĝis sur ĝian supron, kie estis kelkaj benkoj. De monteto vidiĝis belega pejzaĝo kun akvokonservejo. Maldekstre malsupre estis haveno “Montetoj”, dekstre post densaj arboj estis samnoma boata stacio. Stariginte sakon sur unu el benkoj kaj montrinte per mano boatan stacion mi decidis foriri, sed mia kunirantino neatendite demandis:

– Ĉu vi povas boati kun mi?

“Mi tion ne bezonas,” – mi pensis.

– Vi luprenu boaton, kaj mi en tiu tempo ŝanĝos mian veston, – ŝi daŭrigis.

Mi tre miris pro tia aroganteco. Ne sciante respondi kion por ne ŝajni je malĝentilo mi komencis malleviĝi al boata stacio dum tio elpensante, kiel rifuzi tiun peton. Tra trairejo en arbitaro laŭ ligna sternaĵo mi aliris al tabula dometo, kiun oni kolorigis per verda koloro, kun malgranda fenestro kaj surskribo “Kaso”.

– Diru, kion mi devas fari por lupreni boaton? –

mi demandis.

– Vi devas doni pasporton aŭ alian dokumenton, –kasistino respondis.

– Ĉu mi povas doni studentan membrokarton?

– Jes, vi povas.

– Kiom kostas boato?

– Unu rublon dum unu horo.

Mi returniĝis kaj iris laŭ sternaĵo supren. Mi diros, ke mi ne havas dokumentojn kaj monon, mi elpensis pretekston. Sed se ŝi havas pasporton kaj monon, kion tiam mi devos fari? Decidinte nenion mi eliris el arboj al benkoj, kie lasis mian kunirantaron. Kontraŭ mi staris sunbruna junulino kun nekredible bela staturo. Ŝi estis vestinta sin per blua banvesto kun blanka strio laŭ randoj kaj kun blua rubando, kiu ĉirkaŭprenis lumajn harojn nemulte pli alte ol frunto. Ĉielbluaj okuloj rigardis min kun intereso, al mi ŝajnis, kun ia demando. Maldika talio, altaj mamoj, grandaj koksoj... Ĉio estis en tia harmonio, ke mi pensis: “Kun ŝi mi plezure boatos”. Mi staris kaj per okuloj serĉis mian kunirantaron.

– Kiun vi serĉas? Mi estas ĉi tie, – belulino diris.

Mi ne kredis al miaj oreloj. Mia rigardo falis al starantaj sur benko sako kun surskribo “Dinamo”. Nun mi ne kredis al miaj okuloj. Ŝi staris kiel eleganta statueto kaj alpinglis harojn en streĉa fasko.

– Ĉu vi luprenis boaton? – ŝi ree demandis min.

Mi staris kiel ensorĉito kaj ne povis diri eĉ unu vorton. Mia spirado haltis, kaj koro bategis. Fininte hararanĝon ŝi prenis sakon kaj iris al mi. Mi returniĝis kaj kuris al verda dometo kun fenestro kaj kun surskribo “Kaso”. Post kelkaj minutoj mi kaj belulino debordiĝis de boata stacio. Ŝi submetinte sakon sub kapo kuŝis sur poŭpo de boato. Mi fikse rigardis ŝin kaj demandis min, kiel mi tia ĉioscia, ĉiovida iris dum dudek minutoj kun tia belulino kaj ne rimarkis tion? Mi miris kaj koleris pro mi. Tamen dubo ne lasis min. Al mi ŝajnis, ke okazis ia eraro, ke verŝajne mia kunirantino restis tie, sur bordo, sed tiu belulino miksis min kun iu alia homo. Sento nerealeco posedis min. Mi nervumis kaj remis. Boato tranĉis kurantajn ondojn kun bruo flankenjetante ilin al diversaj flankoj. Mi rapidis pli malproksime fornavigi de bordo. Belulino nemulte leviĝinte kaj apoginte sin je rando

de boato ridetante diris:

– Kia estas via nomo?

– Aleksandro.

– Aleksandro, kial vi rapidas? Ja tio estas ne konkuro, vi povas remi pli malrapide.

Mi malpliigis rapidon. Nun boato navigis laŭ bordo. Belegaj pejzaĝoj vidiĝis de boato. Post kruta sabla bordo estis malkruta plaĝo, sur kiu kuŝis bruniĝantaj banantoj. Arbaro foriris profunden farinte grandegan arbarkampon, en kiu staris multkoloraj baldakenoj kontraŭ suno. Malproksime sur fono de malhela arbaro vidiĝis dometoj de negranda vilaĝo. Vilaĝo similis jen bildon jen dekoracion – tian neordinaran aspekton ĝi havis.

Antaŭe vidiĝis negranda meato farita per rivero. Mi direktis boaton al tiu meato. Akvo ĉi tie estis kvieta kaj balanciĝis kiel likva vitro brilante per sunaj rebriloj. El arbaro laŭ rivero venis densaodoro de herboj, algoj kaj pingloj. Venis tempo, kiam naturo kvazaŭ dormis, ĉio moviĝis malrapide, flue, lace. Suno tenere karesis nin per siaj radioj. Boato malrapide moviĝis inter bordoj, kiuj estis kovritaj per densejoj de karekso. Ĉie vidiĝis nufaroj. Mia belulino fleksiĝis post rando de boato, mallevis manon en akvon kaj, deŝirinte unu nufaron, enigis ĝin al siaj haroj. Ŝi rigardis min kokete ridetante, komprenante, kiel impresis min. Mi rememoris versojn de Puŝkin<sup>1</sup>:

Ĉio en ŝi estas harmonio, ĉio estas miraklo.

Ĉio estas pli alte ol mondo kaj pasioj.

Ŝi honteme kuŝis

En sia pompa beleco.<sup>2</sup>

– Kia varma estas akvo ĉi tie. Mi volas baniĝi, – mia belulino diris kaj malleviĝis al akvo tenante al boato.

Poste ŝi naĝis apude. Ŝi naĝis neordinare. Kuniginte gambojn kaj brakojn plilongiginte tutan korpon ŝi faris ondemajn movojn kaj naĝis, kiel naĝas delfenoj. Ŝi subakviĝis kaj elsaltis el akvo por ree subakviĝi. Ŝi jen turniĝis ĉirkaŭ sia akso, jen plonĝis profunden longe haltigante spiradon. Ŝia fleksa

eleganta korpo jen aperis super akvo, jen ree malaperis. Beleco kaj rapido de ŝiaj movoj sorĉis. Mi observis tiun spektaklon kun granda miro. Nenion similan mi antaŭe vidis. Estis momento, kiam al mi ŝajnis, ke tio estas ia mistiko, ia sonĝo, ke ŝi estas ne junulino sed ia mara ulo. Mi eĉ rememoris rakontojn pri undinoj, kiuj allogas junajn homojn al sia akva regno. Ĉi ĉio estus ridinde, sed tiam al mi ŝajnis, ke tio estas tute reale.

Elplonĝinte en vica fojo el akvo ŝi kaptis rando de boato kaj etendis al mi manon. Mi helpis al ŝi surrampi en boaton. Ŝi sidis al poŭpo fleksinte gambojn kaj kliniĝinte al flanko komencis elpremi harojn. Ŝi efektive similis undinon, kiu sidas sur rokaĵo. Suno oris ŝia bronza korpo. Mi ne povis deŝiri rigardon de ŝi.

Nemulte movante remilojn mi kondukis boaton supren laŭ fluado de rivero. Ĝia fluejo jen mallarĝiĝis tiel, ke mi tuŝis per remiloj ĝiajn bordojn, jen larĝiĝis malkovrante novajn belegajn pejzaĝojn. Suno subirante al horizonto aldonis al tiuj pejzaĝoj oran kaj rozkoloran farbojn. Tempo pasis nerimarkeble, venis momento, kiam mi devis redoni boaton. Ni navigis reen. Redoninte boaton mi kun mia belulino iris laŭ sabla strio. Ŝi iris laŭ rando de ondofrapado leviĝinte sur pintoj de fingroj kaj plilongiĝinte kiel baletistino. Ondoj maldiligente lekis ŝiajn piedojn forigante piedsignojn. En radioj de sunsubiro ŝi ŝajnis al mi je fabela nimfo, kiu glitis laŭ apudborda strio. Mi iris post ŝi kaj admiris gracion kaj elegantecon de ŝia svelta staturo, mi kun plezuro observis, kiel rigardas ŝin aliaj homoj. Virinoj ĉesis paroli, direktis al ŝi siajn mirajn kaj enviajn rigardojn. Viroj rigardis kun admiro. Eĉ knaboj puŝante unu la alian al flankoj kapoklinis al ŝia direkto. Jes, ŝi estis Reĝino de plaĝo. Mi pensas, ke multaj homoj enviis min kaj kun plezuro okupis mian lokon akompanante tiun Reĝinon.

Tiel ni ĝisiris ĝis fino de sabla strio, kie en bordo estis densejoj de karekso. Bordo ĉi tie estis marĉa kaj ŝlima. Ni turniĝis al vojeto, kiu kondukis tra arbarkampo reen al boata stacio. Mi denove ĝuante mian memamon akompanis ŝin por envio de viroj, kiuj rigardis nin. Trairinte maldensan arbareton ni

<sup>1</sup> *Puŝkin – plej fama rusa poeto.*

<sup>2</sup> *Laŭvorta traduko.*

leviĝis al monteto, kie antaŭ kelkaj horoj okazis apero de mia belulino. Jen estas tiu benko. Mi starigis sakon sur ĝi kaj eksidis mem. Mia belega kunirantino estis post mi, malfermis sakon kaj komencis ŝanĝi sian veston. Mi rigardante malproksimen kun admiro rememoris tujn okazintajn eventojn. Kia estas donaco de sorto! Kiel tiu petolulo-sorto povas fari tiel, ke el nenio aperas tia miraklo! Neatendite en naturo inter naturaj dekoracioj sur verda kaj akva scenejo sorto montris al mi mirindan spektaklon.

Mi sidis impresita post tio, kion mi vidis, kaj rigardis, kiel estingiĝas tago, kiel laŭgrade velkas arbaraj farboj, kiel longaj mallumaj ombroj rampas de arboj. Suno malrapide subiris banante en oraj nubetoj. Grandega vesperruĝo kun dimensio de duono de ĉielo pendis super arbaro.



*Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova*

– Ĉu vi akompanos min? – mi ekaŭdis post mi.

– Jes, jes, certe, – mi ĝoje respondis, preninte sakon ekstaris ĉirkaŭirante benkon kaj returniĝis al mia kunirantino. Antaŭ mi iris ia virino de malgranda staturato vestinta sin per kaptuko, bluzo, griza longa jupo kaj sportŝuoj. Mi staris ĉirkaŭrigardante al flankoj kaj nevole serĉis per okuloj mian belulinon. Virino returniĝis, svingis al mi manon.

– Kial vi staras? Mi malfruos al buso, iru pli rapide.

Mi ree ne kredis al miaj oreloj kaj okuloj. Mi iris post ŝi kaj konstante instinkte rerigardis reen atendente, ke nun el arboj aperos mia belulino. Mi volis reveni, sed miaj piedoj moviĝis mem, kvazaŭ ia mistika forto regis ilin. Mi rigardis rapide paŝantajn antaŭe sportŝuojn, balanciĝantan jupon penante ekvidi

tiujn belegajn formojn, tiun elegantecon kaj gracion. Sed nenio memorigis pri tio. Okazis ia terura substituo. Mi komencis timi pro mia kapo. Ĉu mi sonĝis tion? Mi kun mirego rememoris, ke mi pri nenio demandis ŝin, tio estis nenature por mi. Tio estis ia sorĉado, ia mistiko – kvazaŭ ĉion mi observis de flanko. Ĉu oni sorĉis min? Ĉu antaŭe iras maljunulino-sorĉistino? Teruro okupis min, tremo kuris laŭ mia korpo. Sed estis unu nekontraŭdirebla materiala atestilo de reala ekzisto de ĉiuj eventoj – tio estas sako kun surskribo “Dinamo”, kiun mi portis. Ĝi konstante ĉeestis dum ĉiuj eventoj. Nun mi volis halti, ĵeti tiun sakon al tero kaj krei: “Tio ne povas esti!” Sed ia mistika forto kiel per magneto tiris min al tiu stranga kunirantino.

Jen estas ĝiba ponto. Trairinte ĝin ni leviĝis al haltejo laŭ kruta ŝtuparo al rando de placeto. Buson finis enbusiĝon. Mia kunirantino rapide returniĝis, kaptis sian sakon kaj kuris al buso. En lasta momento ŝi saltis al ŝtupeto de malantaŭa pordo de buso kaj svingis al mi manon. Pordoj fermiĝis. Buso komencis malrapide elveturi al vojo. Mi kondukis ŝin per rigardo, ĝis kiam buso forveturis.

Suno subiris en nigran nubegon, rapide densiĝis krepusko. Mi staris kaj ne povis ekmoviĝi de loko intense rememorante – kia estas ŝia nomo? Sed nur unu frazo kiel pendolo batis en mia kapo: “Reĝino de plaĝo, Reĝino de plaĝo...”

*Esperantigis*



**Igorj Ĥomjakov**

**(Rusio)**



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo  
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,  
Chongqing, 400023, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: [vejdo@163.com](mailto:vejdo@163.com)

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin  
turnu al [www.elferno.cn/penlisto.htm](http://www.elferno.cn/penlisto.htm)

